

**33a ORDINARA DIMANĈO -
13-an de novembro 2016**

PER VIA ĜISFINA PERSISTO VI SAVOS VIN MEM.

Komento al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Luko 21, 5-19

En tiu tempo kelkaj parolis pri la beleco de la templo, pro la ŝtonoj ĝin ornamentaj kaj la votaj oferdonoj de la fideluloj. Tiam Jesuo diris: „Venos tagoj, kiam ĉio, kion vi nun vidas, estos detruita. Ne restos ĉi tie ŝtono sur ŝtono.”

Tiam ili demandis Lin: „Majstro, kiam ĉi tio okazos? Kaj kiu estos la signo, ke ĉi tio alvenos?”

Jesuo respondis: „Estu singardaj, por ke oni ne trompu vin. Ĉar multaj sin prezentos en mia nomo, dirante: ‚Mi estas la Mesianoj!’, aŭ: ‚La tempo alvenis.’ Sed vi ne aŭskultu kaj ne sekvu ilin. Kiam vi aŭdos pri militoj kaj tumultoj, ne timu. Tiaj faktoj devas okazi antaŭe, sed tio ne signifas, ke tuj estos la fino.”

Poste Jesuo diris al ili: „Leviĝos nacio kontraŭ nacio kaj regno kontraŭ regno. Estos ĉie grandaj tertremoj, malsato kaj pestoj, kaj grandaj signoj en la tero kaj en la ĉielo.

Sed antaŭ ĉi tio ili persekutos kaj kaptos vin; ili kondukos vin al siaj tribunaloj kaj al malliberejoj, trenante vin antaŭ reĝoj kaj regantoj, pro mia nomo. Tiam vi atestos pri Mi. Estu sentimaj! Ne zorgu pri via defendo: Mi mem donos al vi la ĝustajn vortojn kaj tian saĝon, ke viaj kontraŭuloj ne povos rezisti nek kontraŭdiri. En tiu tempo vi estos perfidataj eĉ de gepatroj kaj fratoj, de parencoj kaj amikoj. Kelkajn el vi oni mortigos. Vi estos malamataj de ĉiuj pro mia nomo. Sed eĉ ne unu haro de via kapo pereos. Per via ĝisfina persisto vi savos vin mem.”

La evangelio de ĉi tiu dimanĉo estas sufiĉe malsimpla kaj riskas esti miskomprenata. Pro tio ni devas loki ĝin en ĝia historia kunteksto. La evangelio estas de Luko, ĉap. 21 versikloj 5-19. Por kompreni ĝin ni devas fari retropaŝon, je sep jarcentoj, loki nin en la jaro 701, kiam Senaĥeribo, la potenca reĝo de Asirio, komencis sian militiron al Palestino kaj dumvoje jam estis sieĝinta kaj dezertiginta 46 urbojn kaj eksieĝinta la malgrandan Jerusalemon. Reĝo Ĥizkija kaj la tuta popolo vidis sin pereontaj, ĉar Jerusalemo estis tute ĉirkaŭita de la potenca armeo de asirianoj. Nu, kia surprizo je la mateno, kiam estus devinta okazi la sturmatako, ili vidis ke la tendaro estas malplena, estis forlasita.

Kial? La religia, oficiala klarigo, kiu estas donita: interveno de Dio. Fakte ni trovas en la dua libro de Reĝoj, ĉe ĉapitro 19, versiklo 23, ke tiun saman nokton la anĝelo de la Sinjoro, la anĝelo de Javeho eliris kaj trafis en la asiria tendaro 185.000 virojn, do li lasis dezerton da kadavroj, kaj Senaĥeribo, la reĝo de Asirio, malmuntis la tendojn, foriris ree al Ninevo.

Ĉi tiu la religia klarigo. En realo en la skribaĵoj de Senaĥeribo estas dirite ke reĝo Ĥizkija pagis pezegan tributon. Tamen estas fakto, ke tiu okazintaĵo naskis la kredon, ke en la momento de plej granda danĝero por Jerusalemo, Dio intervenos. Estas iu psalmo kiu celebras ĉi ĉion, psalmo 46 ĉe versiklo 6 (5), kie ĝi diras Dio estas en ĝia mezo, ĝi ne ŝanceliĝos.

Do en la momento de plej granda danĝero intervenas Dio. Nun ni legu la evangelion.

Kelkaj parolis pri la beleco de la templo, ĉi tiuj kelkaj estas la disĉiploj, pro la ŝtonoj ĝin ornamentaj kaj la votaj oferdonoj de la fideluloj... La templo de Jerusalemo estis mirindaĵo. Jesuo diris: "Venos tagoj, kiam ĉio, kion vi nun vidas..." La verbo laŭvorte signifas admiras. Kaj tio estas stranga. Jesuo estis parolinta pri la templo kiel kaverno de ŝtelistoj kaj rabistoj. Liaj disĉiploj, kontraŭe, daŭre sentas ĝian allogon, la admiron. "...estos detruita. Ne restos ĉi tie ŝtono sur ŝtono...".

Kial ĉi tio? La antaŭa epizodo estis tiu de la vidvino kiu elĉerpiĝis, fordonis sian tutan vivon por daŭre vivteni ĉi tiun institucion. La institucio per siaj enspezoj estus devinta vivteni la malfortulojn de la socio. Sed la religia institucio estis distordinta ĉi ĉion. La malfortuloj vivtenis tiun institucion. Do, laŭ Jesuo, iu religia institucio kiu, anstataŭ helpi la lastajn, la malfortulojn, ilin ekspluatas por sia vivtenado, ne havas pravigon ekzisti. Jen kial Jesuo diras: "...estos detruita. Ne restos ĉi tie ŝtono sur ŝtono...". Kaj ankoraŭ hodiaŭ en Jerusalemo oni povas vidi la ŝtonojn defaligitajn de la romianoj en la sieĝo de la jaro 70.

Tiam ili demandis Lin: „Majstro, kiam ĉi tio okazos? Kaj kiu estos la signo, ke ĉi tio alvenos?“ La disĉiploj estas nek zorgoplenaj nek maltrankviligitaj, ili nur volas scii kiam. Kial? Kiel ni diris antaŭe, oni kredis ke en la momento de plej granda danĝero por Jerusalemo Dio intervenos. Tion

esperas la disĉiplojn. Ili ankoraŭ esperas, ke la Sinjoro venos restarigi la mortintan regnon de Israelo. Sed Jesuo respondis: "Estu singardaj..." Temas pri ordono "por ke oni ne trompu vin. Ĉar multaj sin prezentos en mia nomo, dirante: „Mi estas la Mesio“ Mi estas, ja estas la dia nomo "aŭ: „La tempo alvenis.“ Sed vi ne aŭskultu kaj ne sekvu ilin.

Jesuo estas senkondiĉa. Ĉiam en la historio estos homoj kiuj opinioj havi ĉi tiun dian mandaton rebonigi, reformi, Jesuo petas ne sekvi ilin. Historie ni scias, ke post Jesuo prezentiĝis pluraj aliaj opiniataj mesioj, el kiuj la lasta estis Bar Koĥba, dirita la filo de la stelo, kiun kelkaj rabenoj eĉ rekonis kiel la mesion senditan de Dio, kaj kiu kaŭzis, sub imperiestro Hadriano, la ribelon kontraŭ la romianoj kaj, fare de la romianoj, la kompletan detruon de Jerusalemo.

"Kiam vi aŭdos pri militoj kaj tumultoj, ne timu. Tiaj faktoj devas okazi antaŭe, sed tio ne signifas, ke tuj estos la fino." Jesuo diras, ke oni ne ekscitiĝu en ĉi tiu atendo, ĉar ili opinias ke estas la momento inaŭguri la regnon de Israelo. Jesuo diras ke ne estos tiel.

Poste Jesuo diris al ili... Kaj ĉi tie por kompreni ĉi tiujn esprimojn oni devas rilatigi sin al la lingvaĵo per kiu la profetoj priskribas grandajn sociajn renversiĝojn. "Leviĝos nacio kontraŭ nacio kaj regno kontraŭ regno. Estos ĉie grandaj tertremoj, malsato kaj pestoj..." Tiuj estas la bildoj, kiujn la profetoj utiligas por indiki la grandajn sociajn renversiĝojn.

"Kaj estos grandaj signoj en la tero kaj en la ĉielo". Ĉi ĉio estas bildo por teruri. Ni vidos ĉe la fino de ĉi tiu epizodo ke Jesuo parolos pri signoj de liberiĝo por la siaj. Sed ĉi tiu renversiĝo, ŝanĝiĝo, bedaŭrinde ne estos sendolora por liaj disĉiploj. Ĉi tiu mesaĝo estas kuraĝiga por la kristanaj komunumoj, kiuj vidas sin persekutataj, marĝenigitaj.

Sed antaŭ ĉi tio ili persekutos kaj kaptos vin..." Kaj ĉi tie Jesuo prezentas la tri sanktajn valorojn sur kiuj sin tenas la socio, nome Dio, patrujo kaj familio, ĉiuj kunigitaj sub la signo de la povo super la homoj. Nu, ĉi tiuj tri sanktaj valoroj – per sankta valoro oni komprenas valoron por kiu licas fordoni sian vivon kaj forpreni la vivon de aliulo – ribelos kontraŭ la disĉiploj de Jesuo.

"...ili kondukos vin al siaj tribunaloj kaj al malliberejoj, trenante vin antaŭ reĝoj kaj regantoj, pro mia nomo. Tiam vi atestos pri Mi. Estu sentimaj! Ne zorgu pri via defendo: Mi mem donos al vi la ĝustajn vortojn kaj tian saĝon, ke viaj kontraŭuloj ne povos rezisti nek kontraŭdiri". La evangeliisto anticipas la scenon, kiun poste li prezentos en la Agoj de la Apostoloj, pri la martirigo de Stefano, kiu havos al siaj kontraŭuloj vortojn, al kiuj liaj kontraŭuloj ne kapablos rezisti. Kaj ankaŭ Stefano tuŝis la templon de Jerusalemo, la kernan strukturin de ĉi tiu religia institucio. Kial ĉi tiu tuta malsimpatio al Jesuo kaj al la siaj? Ĉar la universala mesaĝo - anoncita de Jesuo – pri la regno de Dio, nuligas la privilegion de Israelo esti la unua inter la nacioj, kaj la revon pri lia regado. Ĉi ĉio ne estos sendolora.

Kaj eĉ, diras Jesuo... do ni vidis Dion, la religion, la patrujon, la regantojn, sed "Vi estos perfidataj eĉ de gepatroj kaj fratoj, de parencoj kaj amikoj. Kelkajn el vi oni mortigos"; ĉi tie la rilatigo estas al la libro Readmono, kie oni preskribas ke eĉ licas mortigi la idolanan parencon. Do la aliĝo al Jesuo, antaŭ la okuloj de la socio, estas idolkulon kiu meritas la morton.

La aliĝo al Jesuo, kun la radikala renversiĝo de la valoroj, estas krimo tiom granda, ke ĝi eĉ sukcesas nuligi la plej striktajn ligojn. "Vi estos malamataj de ĉiuj pro mia nomo". Do la persekuto ne estas antaŭviditaĵo en la vivo de la kredanto, sed ĝi estas la konfirmo ke oni sekvas Jesuon.

Kaj jen la trankviligo de Jesuo: "Sed eĉ ne unu haro de via kapo pereos. Per via ĝisfina persisto vi savos vin mem." Do Jesuo certigas ke fare de Dio estos lia protekto, kaj ĉi tiu ne estas mesaĝo kiu timigas aŭ donas korpremon, sed kontraŭe forigas ĝin. Kaj ni trovas ĝin fine de la ĉapitro, ĉe versiklo 28, kiam Jesuo diras: "Kiam tio komencos okazi rigardu supren kaj levu viajn apojn, ĉar via elaĉeto aproksimiĝas". Do tio kion ni diris estas mesaĝo kiu ne donas timon, sed forprenas ĝin.

Jesuo nin certigas ke la liberiĝo estas proksima. Certe ĉi tiu liberiĝo ne estos sendolora, oni devos suferi, sed Jesuo estas ĉiam ĉe la flanko de la persekutatoj, neniam ĉe tiu de la persekutantoj, eĉ se la persekutantoj pretendas fari tion en lia nomo.